

BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

MĚSÍČNÍK PRO ŠÍŘENÍ ESPERANTA MEZI ČECHY.

ORGÁN „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ V RAKOUSKU.

ZODPOVĚDNÝ REDAKTOR:

H. K. BOUŠKA.



ROČNÍK IV.
(ŘÍJEN 1909—ZÁŘÍ 1910.)



PRAHA 1910.
NÁKLADEM JANA IGLAUERA V PRAZE. — TISKEM „POLITIKY“ V PRAZE.

BOHEMA ESPERANTISTO


ČESKÝ ESPERANTISTA

MĚSÍČNÍK PRO ŠIRŠÍ ESPERANTIA MEZI ČECHY

ORGAN SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ V RAKOUSKU

ZODPOVĚDNÝ REDAKTOR

H. K. BOUŠKA



ROČNÍK IV.

RODNÍ 1903 ZÁŘÍ 1903



TRAVNÍ 1903

NAKLADEL J. W. BERTHOLD, PRAHA — TISKEM POLNÍKY V TRAVNÍ

PŘEHLED OBSAHU TABELO DE L' ENHAVO

ČLÁNKY ČESKÉ.

JUC. Jos. Barviř: <i>Pátá mezinárodní manifestace esperanta</i>	17
Bšk.: <i>Mladí čeští esperantisté</i>	93
Prof. Rud. Fridrich: <i>První manifestace moravských esperantistů</i>	161
Hkb.: <i>První všerakouský sjezd esperantistů</i>	99
Prof. Christaller-Boža Vaníčková: <i>Esperanto ve škole</i>	34
Jos. Krumpholz: <i>Význam esperanta pro Čechy a Slováky</i>	1, 33, 49, 65, 81, 97, 166, 177
Dr. L. L. Zamenhof-Karel Maršík: <i>O vzniku esperanta</i>	67, 82, 129

ARTIKOLOJ ESPERANTAJ.

H. K. Bouška: <i>El la bohema floraro</i> (l. J. S. Machar: <i>Konfese literáta</i>)	44
— <i>Pensoj el la libroj</i> (l. L. L. Zamenhof: <i>Proverbaro esperanta</i>)	158
— <i>Zamenhof</i>	20
Bšk.: <i>Junaj bohemaj esperantistoj</i>	93
K. J. Erben-B. S. E. <i>La ora trezoro</i>	106, 140
Joseph Eydelnanth: <i>Antisemitismo kaj progreso</i>	3, 24, 41, 70
Rud. Fridrich: <i>La Moravia karsto</i>	155, 187
Dr. Jiří Guth-Jan Iglauer: <i>Turismo en Bohemujo kaj Moravio</i>	152
Alois Jirásek-Jos. Barviř: <i>Konscienco</i>	132
J. Kaliszewski-Kabe: <i>La juĝo</i>	53, 72
Dr. Stan Kamaryt: <i>Propagando de internaciaj movadoj</i>	68, 88
— <i>Optimismo</i>	102, 130
F. V. Krejčí-H. K. Bouška: <i>Deveno de la religio</i>	51
T. G. Masaryk-Rud. Hromada: <i>Moderna amo</i>	86
Jan Neruda-H. K. Bouška: <i>Kiel sinjoro Vorel fumumis sian marĝaŭman pipon</i>	156, 170
Rl. Niall: <i>La nokto en la Granda mortinta ĥoro de Aŭstralio</i>	5
Fr. Procházka-Rud. Fridrich: <i>Alta ordono</i>	55
— — <i>Justeco</i>	75
— — <i>Leonido</i>	25
— — <i>Ŝtelinto de ŝlosiloj</i>	93
Jan Otcovský: <i>Sub esperantista standardo</i>	103
L. W. Tolstoj-A. Blindkopf: <i>La patriotismo kaj registaro</i>	145, 168, 178
Em. Trummlitz: <i>La sep ĥorvoj</i>	90

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

H. K. Bouška: Esperantista movado inter Bohemoj, 77. Unua jaro de »Bohema asocio esperantista«, 8. — *Bšk.*: Inicilo matematika, 175. Kie naskiĝis Comenius, 76. La unua kunveno de moraviaj esperantistoj, 172. — *J. Eydelnanth*: Nacionalismo, 75. — *Hkb.*: Dek moralaj odonoj de Komenský, 77. — *Kamaryt*: La IV. kongreso de »Internacia asocio de akademioj«, 174. Mondkongreso de la internaciaj asocioj, 173. Pri la libereco, 75. Unuanimeco, 175. — *Nemo*: Esperantistaj organizaĵoj en Praha, 78. La indoeŭropaj lingvoj, 76. — *O. S.*: Deklaro de »Bohema asocio esperantista« pri la kongreso de BUE, 7. La loko de la sesa internacia kongreso esperantista, 107. — *Otcovský*: Esperantaj fajreroj, 175. — *Pasanto*: 10 konsiloj al la esperantaj tradukantoj, 77. — *Red.*: Antaŭ la kongreso de bohemiaj esperantistoj en la jaro 1910, 108.

INFORMACE A DOKUMENTY.

Hkb.: Malé naučné slovníky v esperantu, 117. Počet propagačních spolků esperantistů v l. 1888—1909, 190. Statistika esp. literatury, 190. Vzrůst esperantistického časopisectva od r. 1889 do r. 1909, 191. — *Nemo*: Esperantské knihy českých autorů, 12. — *S. O.*: O zkouškách z esperanta, 12. — *Red.*: Komenský v literatuře esperantské, 118. — *S. K.*: Letákové průvodce Světového svazu esp., 117.

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Bšk.: Morana ve »Svazu čes. esp.« (prof. Ant. Kryštof, G. Šesták), 59. Na sjezdu »Unie čes. esp.«, 59. První sjezd Světového svazu esp., 111. První valná schůze »Svazu čes. esp.«, 26. Svazy mladých esp., 113. Socialisté a esperanto, 28. — *Fch.*: Esp. na vyšší dívčí škole v Přerově, 143. — *Hkb.*: Aviatikové-esperantisté, 29. Esp. na americkém lékařském sjezdu, 28. Esp. na mezinárodních sjezdech, 10. Esp. mezi franc. mládeží, 56, 113. Esp. ve vojenských časopisech, 118. Mezi polskými esp., 29. Ochodní komory franc. a esp., 112. První mezinárodní sjezd katolíků esp., 142. Rumunská královna a esp., 9. Tvůrce esp. španěl. šlechticem, 9. Vyučování esp. na školách, 29, 112. Zákonem zavedené vyučování esp., 112. Zasilání esp. telegramů, 118. — *Jš.*: Esp. knihy ve vojenské knihovně, 114. — *Kamaryt*: Volby do jazykového výboru esp., 30. — *Kr.*: Esp. pomůckou žurnalistickou, 114. Esp. anketa o poměrech industr. učitelek, 114. — *Kronikář*: České přednášky o esp., 11, 58, 143. Jubileum tvůrce esper., 57. Rozmanitosti z esp. hnutí, 10, 56, 115, 143. Veřejné kursy esp. pro Čechy, 11, 58, 144. Výstavky čes. esp., 58. Vyučování esp. na čes. školách, 10, 58. — *Nemo*: Esp. informace v Prostějově, 143. Esp. protest proti Maďarům, 29. Esp. na světové výstavě v Bruselu, 113. Mezinárodní policejní svaz esp., 113. Městské rady a esp., 56. Oficiální kursy esp. v Londýně, 10. První mezinárodní sjezd katolíků, 56. Subvence městských rad esp., 56, 113, 143. Šestý mezinárodní kongres esp., 56, 111. — *O. S.*: Esp. večírek ve Vítkovcích, 12. — *Red.*: Den esp. na výstavě v Nasavrkách, 143. J. S. Machar a esp., 57. O fundamentalistech a idistech, 115. O Kühnlově učebnici, 114. Překlady z »Čes. esp.«, 115. — *Sch.*: Esp. v Čes. obchod. museu, 114. Mezinárodní spolek pro rozvoj obch. nauk a esp., 113. — *Rud. Sackmauer*: Mezinárodní sdružení železničních úředníků esp., 29. — *S. K.*: Král španělský a esp., 118. První schůze moravských esp., 141. — *Vjt.*: Rakouské ministerstvo železnic a esp., 142.

ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

Pražští esperantisté, 94. — Pro propagační fond »S. č. e.«, 96, 117. — Spolkům sdruženým ve »S. č. e.«, 119. — Řečníky o esper., 31. — Správní výbor »S. č. e.«, 30., — Komise pro zkoušky z esp., 13, 176. — Svaz českých esperantistů, 13, 119, 144, 176. — Česká společnost esperantistů v Praze, 13, 94, 119. — První dámský český spolek esperantský, 14, 119. — Klub malostranských esperantistů, 31. — Klub esp. v Hostomicích p. Brdy, 60. — Klub esp. na Kladně, 95. — Klub esp. v Liboci-Hvězdě, 144. — Klub čes. esp. v Brně, 14. — Klub esp. v Bystřici p. H., 14. — Klub. esp. »Verda stelo« v Ivanovicích, 120. — Klub esp. v Prostějově, 60. — Klub esperantistů, šachistů a hádankářů z Ostravska ve Vítkovicích, 14, 60, 95, 176. — Kroužek esp. v Žižkově, 14. — Koužek esp. ve Chvalkovicích, 14. 95. — Esp. odbor »Občanské besedy« v Dol. Kralovicích, 120. — Z mimosvazových spolků čes. esp., 96.

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Libroj kaj broŝuroj. — S. Blaŝko: La kometo de Halley, 191. — Émile Boirac: Plena vortaro esperanto-esperanta kaj esperanto-franca, 14, 121. — J. Borel: Praktika frazaro, 121. — Th. Cart: Pri la indo-eŭropaj lingvoj kaj esperanto, 122. — Mikaelo Cases: Unu fojon..., 15. — Dro P. Corret: Raporto pri la kvina kongreso de esperantistoj, 78. — Dr. E. Crozat: Dum kongreso, 15. — Ernst Eckstein: La vizito en la karcero, 191. — M. Inman: Gulliver en Liliputlando, 14. — Kabz: Vortaro de esperanto, 120. — Prof. dr. S. Lederer: Esperantista poŝtkalendaro, 60. — Edmée Nodot: La Puntistino, 15. — Eliza Orzesko: Marta, 121. — Török Péter: Porĉiama kalendaro, 122. — J. Poruks: La vakciniuja krono, 121. — Roksano: La fianĉiniĝo de Sovaĝulineto, 78. — Général Sebert: Esperanto et les langues nationales, 15. La langue internationale auxiliaire esperanto, 123. Modela klasifiko de la esperantaj bibliotekoj, 122. — Ch. Verax: Enciklopedia vortareto esperanta, 120. — Dro Cyrillo Vörös: Analitika geometrio absoluta, 122. — Dro L. L. Zamenhof: El dramoj tradukitaj el germana lingvo, 31. El la tragedioj, 31. — Dictionnaire esperanto-français, 79. — Tri rakontoj, 121. — La biblia profeto Cefanjaho, 122. — Kvina universala kongreso de esperanto, 122. — La granda monato de esperanto, 122. — T. E. K. A. Jarlibro, 123. — Literatura almanako de L. I., 191. — Gramatiko de ile (A. Seidl), 127.

Gazetoj kaj revuoj. — Anoncoy-jurnalo, 32. — Anda lumo, 127. — The British Esperantist, 62, 79, 125. — Bulletin officielle de la S. f. p. p. e., 127. — Dia regno, 16, 24. — Esperanta gazeto, 127. — L'Espérantiste catholique illustré, 127. — La Esperantisto, 62. — Esperanto, 15. — Esperanto et Croix Rouge, 127. — Esperanto-nouvelles, 62. — L'Elpilingue, 127. — Finna esperantisto, 80. — Gazeto Andaluzia, 80. — Germana esperantisto, 31, 79, 124. — Germana esperanto-gazeto, 32. — Gestudentaj interesoĵ tuthomaraj, 191. — Greklingva esperantisto, 127. — Ĥina esperanta revuo, 63. — Idealisto, 80. — Informaj raportoj, 79, 125. — Internacia scienca revuo, 15. — Japana esperantisto, 63. — Juneco, 62. — Kataluna esperantista, 126. — Kolumbia stelo, 32. — Korrespondenz des deutschen Esperanto-Bundes, 32. — Lingvo internacia, 31, 62, 124. — Lumo, 126. — Le Monde espérantiste, 192. — Norda gazeto, 63. — Oficiala gazeto esperantista, 61. — La Ondo de esperanto, 80. — Paris-esperanto, 126. — Pola esperantisto, 62, 126. — Progreso, 63. — La Propagandisto, 124. — La Revuo 61, 79, 123. — Rund um die Welt, 16, 127. — Samideano ĉiumonata, 124. — La Semajno, 124. — Semo, 80. — Serba esperantisto, 126. — La Simbolo

62, 124, — Studento, 16. — Verda stelo internacia, 32. — Ricevitaj gazetoj, 16, 32, 63, 80, 128.

Diversaj eldonaĵoj. — Serio da vidaĵkarto el la kvina kongreso, 16. — Esperantaj muzikaĵoj, 32, 123. — Ricevitaj eldonaĵoj, 63, 80, 123.

RŪZNÁ SDĚLENÍ.

Adm.: Písemný kurs esp., 48. — *Red.:* Esp. klasobraní z děl čes. autorů, 48. — *R. N.:* Psací stroj Regina 16.

DIVERSAJ KOMUNIKOJ.

Adm.: La administracio de »Č. e.«, 64. — *O. S.:* Dankesprimo de Dr. L. L. Zamenhof, 64. — *Red.:* Manuskripto por la preso, 64. — *R. N.:* La unua kroata verko en esp., 64. Skribmaŝino Regina 16.

AL LA LEGANTOJ.

Ni prezentas al la legantoj la kvaran jarkolekton de la unua bohem-esperanta revuo »Bohema esperantisto« (Český esperantista) — la duan jarkolekton sub nia redakcio.

Kiel en la antaŭa, tiel ankaŭ en la nuna jarkolekto de tiu ĉi propaganda revuo ni zorge klopodis vastigi (en la bohema parto de la revuo) la konojn kaj sciojn pri lingvo internacia ĝenerale kaj pri esperanto speciale kaj la posedon de la lingvo de Zamenhof, ni klopodis vekí kaj subteni (en la esperanta parto) la sencon kaj komprenon por la modernaj problemoj kaj ideoj internaciaj, humanecaj kaj progresemaj, la senton por la vero, bono kaj belo, la konojn pri la bezonoj kaj aranĝoj de l' internacia vivo kaj sciojn pri rimarkindaj aktualaĵoj.

Estas vere, ke ni ne atingis ĉion, kion ni deziris, sed tio ĉi estas afero tute natura kaj komprenebla: nia programo estas tre ampleksa kaj diversflanka — nia revuo estas ne-granda kaj batalanta kontraŭ multaj malfacilaĵoj. Tamen ni povas fiere konstati — sen ombro de malmolesteco —, ke ni laboris kun la amo, bona volo kaj plena kompreno por la afero, ke ni faris ĉion, kion ni povis fari en la nunaj, tre malfacilaj cirkonstancoj, kaj la homo bonvola kaj sperta en la vivo ne povas preterrigardi, ke ni sukcesplene penis, ke la nivelo de nia revuo estu kiel eble plej alta, ke nia revuo per siaj enhavo kaj ekstera aranĝo inde reprezentu la boheman esperantistaron kiel fremdlande tiel hejme. Rigardu la tutan jarkolekton! Sur malmultaj negrandaj paĝoj ni donis valorajn kaj seriozajn verkaĵojn, kiujn certe multa leganto ofte relegos: ni kolektis interesajn bohemajn artikolojn pri la problemo de lingvo internacia kaj pri ĝia solvo, belajn esperantajn artikolojn pri rimarkindaj problemoj kaj okazaĵoj aktualaj kaj internaciaj, bonajn tradukojn de rakontoj de diversnaciaj verkistoj, koncizajn kritike elektitajn kaj revue ordigitajn bohemajn raportojn pri nia movado en fremdlandaro, detalajn kaj fidindajn sciigojn pri la stato de esperantismo en niaj landoj, multajn kaj precizajn informojn pri

l' organizo kaj historio de esperantismo, pri l' esperantaj literaturo kaj gazetaro ktp., sekve ankaŭ tiu ĉi jarkolekto, kiel ĉiuj antaŭaj, donas riĉan materialon al nuntempaj propagandantoj kaj venontaj historiografoj de nia movado. Cetere ni promesas, ke ni faros en la venontaj jaroj, kion ni ne faris ĝis nun. Niaj amikoj scias, ke ili povas fidi al ni.

Kun plezuro ni konstatas, ke la rondo de niaj kunlaborantoj konsistas el multaj eminentaj esperantistoj bohemiaj kaj fremdlandaj, kaj ke ni sukcesis gajni por kunlabori multajn novajn kapablajn kaj spertajn esperanto-verkistojn, kies artikoloj aperos en la venonta jarkolekto. Tiu ĉi kunlaboro estas por ni agrabla garantio, ke ni sukcesos en nia penado malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj malhelpaĵoj, kontraŭ kiuj ni devas batali.

Ni faras agrablan devon esprimante nian sinceran dankon al ĉiuj, kiuj kiel ajn helpis aŭ helpos al ni, al niaj oferemaj kunlaborantoj, diligentaj korespondantoj, fidelaj abonantoj, kaj ni ĝoje esperas, ke ĉiuj nunaj amikoj de nia revuo kaj de nia asocio konservos plu sian favoron por ni kaj ke ili klopodos, ke la rondo de niaj amikoj kiel eble plej multe pligrandiĝu. Ju pli multe oni helpos al ni, des pli multe ankaŭ ni povos fari.

La redakcio.

62

BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy.
Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Zodpovědný redaktor a vydavatel: Dr. STAN KAMARYT

Redakce:
Praha-III, Kampa 495.



Administrace:
Jevíčko na Moravě.

ROČNÍK III

SEŠIT 12

Články. — Artikoloj.

Prof. Dr. Frant. Krejčí: Význam esperantismu ve vývoji kulturním. — H. K. Bouška-Stan Kamaryt: Fondo de regnaj organizaĵoj de bohemaj esperantistoj. — Jan Neruda-ing. J. Vostatek: Kien ĝin doni? — Vojta Beneš-Ant. Janalíková: Ebriulo. — Karel Horký-H. K. Bouška: Hundó.

Raportoj kaj notizoj.

Influoj de personoj. Deklaro de »Bohema asocio esperantista« pri la kongreso de B. U. E.

Kronika a komentář.

Esperanto pro mládež. Spolek J. A. Komenský v Chrudimi. První sjezd českých esperantistů. Esperantský divadelní večer. Esperantisté před soudem.

Informace a dokumenty.

Valná hromada »Svazu čes. esperantistů«. Veřejné zkoušky z esperanta. Klub esperantistů v Chvalkovicích.

Libroj kaj gazetoj.

PRAHA, 20. X. 09.

Cena 72 h

Vychází 15. dne v měsíci a je zdarma zaslán všem členům »Svazu českých esperantistů«, kteří zaplatili celoroční příspěvek 4 K. — Rukopisy, dopisy, knihy a časopisy zasílají se redakci. — Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka na odpověď. — Všecka díla redakci zasláná jsou oznamována. Reklamace přijímá administrace jen do vyjití následujícího čísla. — Předpláceti a po číslech odebíratí lze u administrace a ve všech knihkupectvích.

Celoroční předplatné 4 K,

pro členy spolků sdružených ve »Svazu Č. E.« 3 K, jednotlivá čísla po 36 h.
Zásilky pro »S. Č. E.« adresujte: Dr. Stan Kamaryt, Praha-VI.

Ĉeský Esperantista-Bohema Esperantisto

monata revuo por propagando de esperanto kaj esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de „**Bohema asocio esperantista**“ (Svaz českých esperantistů), eliras regule la 15-an de ĉiu monato en kajeroj almanaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn, originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj. *Jara abonpago 1.70 Sm. Administracio:* Jevičko, Moravio-Aŭstrio *Redakcio:* Praha III, Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio.

:: Nova adreso :: de nia administracio

estas nun sole:

Praha III., Kampa 495, Bohemujo.

(identa kun la adreso de l' redakcio).



Sdělení redakční a administrační.

Ĉíslem tímto končí III. ročník. 1. číslo IV. ročníku vyjde v nejbližších dnech. Zodpovědnou redakci časopisu na místě p. dr. St. Karmarýta, jenž přesídlil do Plzně, převezme pan Hynek K. Bouška. Ve vedení časopisu nenastanou tím žádné změny a »Český Esperantista« v též úpravě a za téhož pečlivého řízení jako dosud i dále opět v pravidelných lhůtách měsíčních bude vydáván.

Počínaje příštím číslem, převezme vydavatelství a nakladatelství „**Českého Esperantisty**“ p. Jan Iglauer v Praze III. 495., následkem čehož administrace přesídli do Prahy. Předplatné na příští ročník našeho časopisu raďte tedy příště zasílati **na administraci Praha III. 495.**

☞ **Pp. předplatitelé,** kteří získají aspoň jednoho nového odběratele našeho časopisu, obdrží premii dle přání, buď 1. číslo svaz. kn. „**Jazyk všeslovanský a esperanto**“ aneb vkusný kapesní kalendářik, plátnem vázaný se zápisníčkem. ☞



Vkusné odznaky esperantistů

(emailované, trvanlivé) ve formě jehlice, brože neb knoflíku (za 60 hal., poštou 70 hal.) a **esperantské hvězdy** (kravatové jehličky za 40 h) — obě zákonitě chráněné — lze objednat u

„**České společnosti esperantistů**“

v Praze, Zemská banka.

Esperanto v Luhačovicích. Zprávu pod tímto názvem v min. čís. zařadili jsme do čísla nedopatřením. Akce byla sice připravena, ale sešlo s ní i bude podniknuta až v příští sezoně. Čtenáři nám zajisté náš omyl omluví.

Red.

BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

MĚSÍČNÍK PRO ŠÍŘENÍ ESPERANTA MEZI ČECHY.

ORGÁN „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ V RAKOUSKU.

ZODPOVĚDNÝ REDAKTOR A VYDAVATEL:

DR. STAN KAMARYT.



ROČNÍK III.

(ŘÍJEN 1908—ŘÍJEN 1909).



PRAHA 1909.

NÁKLADEM FERD. BOHÁČKA NA MORAVĚ. — TISKEM „POLITIKY“ V PRAZE.

ROMENA ESPERANTISTO

ĈESKÝ ESPERANTISTA

ROK 1921. ČÍSLO 1. PRAHA. VYDANÉ M. J. ČERNÝM.

ORGANIZACE ČESKÝCH ESPERANTISTŮ V RAKOUSKÉ

ČESKÝ ESPERANTISTA

ROK III

ČÍSLO 1

PRAHA

VYDANÉ M. J. ČERNÝM. PRAHA. 1921.

PŘEHLED OBSAHU

TABELO DE L' ENHAVO

ČLÁNKY ČESKÉ.

H. K. Bouška: Čtvrtá mezinárodní manifestace esperanta	21, 37
Dua kongreso-Boža Vaničkova: Prohlášení o nestrannosti sjezdů esperantistických	171
Dr. Enriko Fischer-Fr. Vedral: Jak jsem se stal esperantistou . . .	5
Rudolf Fridrich: Nemožnost mimovolných vývojových změn v esperantu	149
Dr. Stan Kamaryt: Organizace praktického užívání esperanta . . .	133, 154
Prof. Dr. Frant. Krejčí: Význam esperantismu ve vývoji kulturním .	181
Jos. Krumpholc: Jazyk všeslovanský a esperanto	53, 69, 85, 101, 117
Unua kongreso-Vítězslav Herlas: Deklarace o podstatě esperantismu .	141

ARTIKOLOJ ESPERANTAJ.

Heřman Alferi: Esperantismo kaj pacifismo	55, 71
Jakub Arbes-Jos. Grňa: La unua idealo	74, 90
— — — — — Apud la lito de solenaskito	136
Dr. Alex. Batěk: La rezultato de mia paciga entrepreno 6, 48, 61, 109,	125
— — — — — Libera penso kaj esperanto	118
Vojta Beneš-Ant. Janalíkova: Ebriulo	186
H. K. Bouška, Dr. Stan Kamaryt: Fondo de regnaj organizaĵoj de bohemiaj esperantistoj	169, 183
Dr. Jos. Bürger-Karel Biskup: Internaciaj pagoj	58, 70, 86, 102
Dua kongreso: Deklaracio pri la neŭtraleco de la kongresoj de esperanto	171
Dr. Enriko Fischer: Kiel mi fariĝis esperantisto	5
Karel Horký-H. K. Bouška: Hundo	188
Dr. Stan Kamaryt: Progresismo kaj konservativismo	60
Prof. Dr. Frant. Krejčí-H. K. Bouška: Signifo de la esperantismo en la kultura evolucio	156
Prof. Dr. Frant. Krejčí-J. Holub: Signifo de L. N. Tolstoj	3, 24
Jos. Krumpholc: Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo universala	1, 26, 57, 75, 88, 105, 120, 135
Leprince de Beaumont-Era: La Belulino kaj la Besto	28, 75, 91, 106, 123, 139
J. S. Machar-Rud. Fridrich: Antaŭ Jeruzalemo	47
J. S. Machar-Rud. Hromada: Antikva Roma	163
Prof. T. G. Masaryk-Th. Čejka: Laboro kontraŭ r. volucio	121
Aug. E. Mužík-Karel Maršík: La bufo	4
Jan Neruda-ing J. Vostatek: Kien ĝin doni?	164, 184
Prof. Vojtěch Novotný: Pri loĝa propagando de esperanto	159
Unua kongreso: Deklaracio pri esenco de la esperantismo	141

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

J. Barviř: La uzado de esperanto por la korespondado kun fremdularo, 30. — (*H. K.*) *Bouřka:* Fonda ĝenerala kunveno de »B. A. E.«, 9. La kongreso de slavaj instruistoj en Praha, 11. Esperantista movado inter Bohemoj, 12, 63, 78. Kultura societo Babel, 30. Du leteroj, 30. Komuna kongreso de bohemiaj partianoj de esperanto, pacifismo kaj libera penso, 63, 78. — *Břk:* Diverslandaj esperantistoj en Praha, 11. Nova universala lingvo, 12. Universala Frateco, 30. Denis pri Husanoj, 62. Kiu estis Comenius? 77. Bohemiaj organizaĵoj esperantistaj en Praha, 79. Paca tago en aŭstriaĵ lernejoj, 127. — *Hkb:* Esperanto en la jubilea ekspozicio komerca kaj industria en Praha, 11. Kontraŭ ŝovinismo, 49. Komparindaj faktoj, 49. — *Kamaryř:* Influo de personoj, 191. — *Prof. Edm. Kolkop:* Unua libro de tradukoj el la bohema literaturo, 11. — *J. Krumpholz:* Internacia pedagogia revuo, 11. — *O. S. (Oficiala Sciigo):* Turisma sekcio de B. A. E., 12. Deklaro de »Bohema asocio esperantista« pri la kongreso de B. U. E., 192. — *V. Riegel:* Karel Emanuel Macan, 62. — *R. N.:* La apudmaraj vinoj, 63. — *Z. V.:* Libera ligo por defendo de tuthomaraj interesoj, 126.

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

J. Barviř: Schůze českých esperantistů v Drážďanech, 14. Užívání esperanta pro dopisování s cizinou, 16. — (*H. K.*) *Bouřka:* Esperantská brožura, 18. — *Bouřka, V. Riegel:* Schůze slovanských esperantistů v Drážďanech, 14. — *Břk.:* Němečtí esperantisté v Praze, 18. Cizí esperantisté v Praze, 32. První český časopis s esperantským výtahem, 33. Doktorská dissertace o esperantu, 64. Pátý mezinárodní kongres esperantistů, 64, 174. Spolek německých esperantistů v Praze, 81. První květinové hry esperantistů, 111. Morana ve S. Č. E. (Betty Vaníčková, Heřman Alferi), 113. Stálý kongresový výbor esperantistů, 172. Prof. Naville a esperanto, 175. — *Dr. S. K.:* Šeková banka esperantská, 32. Mezinárodní závod pro propagandu esperanta, 93. Řeka »Esperanto«, 112. Jazykový výbor a akademie esperantistů, 127. Ústřední kancelář esperantistů, 143. Mezinárodní ústav pro esperanto, 172. Kongresová pokladna esperantistů, 174. — *N. P. Eustiféieff:* Dorozumivací jazyk Slovanů, 112. — *G. E.:* Třetí kongres německých esperantistů, 64. Vzrůst esperantského časopisectva, 80. — *Jos. Grňa:* Výstava angl. výkresů získaných esperantem, 65. — *Hkb.:* Ustavující valná schůze »S. Č. E.«, 13. Esper. přednáška o Bosně a Hercegovině, 16. Esperanto na praž. sjezdech, 16. Přednášky »O mezinár. kongresu esp. v Drážďanech, 17. Čtyři současné přednášky o esperantu, 17. Liga německých spolků esperantistů v Rakousku, 18. Posrednik a esperanto, 49. Nejvíce kursů esperanta, 64. Světový esp. svaz lékařů, 79. Vyučování esperantu na školách, 80, 144, 176. Esperanto mezi policisty, 80, 144. Esperanto na mezinárodních sjezdech, 80, 128. Esperanto na mezinárodní výstavě v Bologni, 93, 144. Esperanto na I. všeamerickém vědeckém sjezdu, 112. Esperanto mezi ruskou policií, 112. Esperantisté v národní radě české, 113. Veřejné esperantské přednášky, 113. Esperanto mezi japonskou mládeží, 128. Esperanto na obchodních školách švýcarských, 129. Esperanto v mezinárodním obchodním kursu, 144. Užívání esperanta na sjezdech, 144. Řád pro mezinárodní kongresy esperantistů, 173. Vláda brazilská a esperanto, 176. Esperanto v Luhačovicích, 177 (a obálka 12. čís.). — *Hmd.:* Saský ústav pro esperanto v Drážďanech, 79. — *Fr. Chvatík:* Sedm národností v jediném spolku esperantistů, 93. — *iter:* Klub esperantistů v Lomnici n. Pop., 145. — *Kamaryř:* Schůze mezinárodního vědeckého svazu v Drážďanech, 63. Zábavný esperantský večírek v Praze, 94. Knihovna českých esperantistů, 96. —

VÝZNAM ESPERANTISMU VE VÝVOJI KULTURNÍM.

Napsal prof. Dr. Frant. Krejčí.*)

Esperantistou nejsem — bylo by zbytečno uváděti příčiny, jsou zcela nahodilé. Právě proto však nebude lze činiti těmto řádkům hned zpředu výtku zaujatosti. Esperantistou nejsem, ale vždycky jsem s tímto hnutím sympathisoval, zprvu bezděčně a nyní, když jsem si vše uvědomil, z přesvědčení. Věděl jsem, co se namítalo vážně i uštěpačně proti esperantismu, pochopoval jsem indignaci filologů a aesthetiků, kteří odvraceli se od umělého neorganického novotvaru, jakoby byl svévolným, neodůvodněným porušením zákonnosti přírodní, z níž prýští všechna krása a účelnost; ba přiznám se, že ta směsice grammatických a lexikálních prvků, z nichž esperanto jest utvořeno, vyvolávajíc rovněž neladnou směsici ozvěn z řečí mně známých, nezamlouvala se mému vkusu. Praktický zřetel, kterému náš věk tak snadno obětuje vše »jen ideální«, nebyl by mne zbavil této nechuti a nevysvětlil mi, co mne pro esperantism zaujímal. Neholduji zásadě: účel posvěcuje prostředky, i kdyby ten účel byl nejušlechtilejší, neřku-li tam, kde praktickým zřetelem kryje anebo může se krýti docela všední ziskuchtivost v obchodních spekulacích.

Avšak ve snaze po světovém dorozumívacím prostředku vycítil jsem povznášející moment ethický a ten mi vysvětlil všechno.

Esperantism — v širším smyslu vzato jako název pro snahu o jazyk světový — má zdroj v tom, co tvoříc podstatu lidství je hlavní vzpružinou kulturního vývoje; neboť pouhá již snaha po společném prostředku dorozumívacím je důkazem, že všem lidem jest něco společného. K vědomí to přichází jen jakožto společné zájmy, ale společné zájmy jsou exponenty společných potřeb, společné potřeby stejných vnitřních podmínek životních a stejné vnitřní podmínky životní jsou ukazatelem stejné podstaty. Společné zájmy lidí sbližují

*) Z kruhu čtenářů vyzváni, podáváme český originál článku, jehož esp. překlad uveřejnili jsme v čísle minulém, ačkoliv jsme mínili s originálem jinak naložiti. *Red.*

a čím je jich více, tím účinněji paralyzují to, co lidi dělí a co je činí navzájem nepřáteli.

Uvědoměním společných zájmů nezbytně zkrocuje se egoism; a co k tomu přispívá, je tím samým hyblem mravního vývoje, spolupodmínkou mravního zušlechtění. Taková věc je ethicky oprávněna, snahám o ni vtiskuje se pečť ideálnosti, a praktický zřetel, v němž po případě — jako u esperanta — spatřován bývá nejbližší důvod oprávněnosti, nemůže snahy ty strhnouti ve všednost hmotného prospěchářství. Snahy esperantismu jdou výše, a kdo nepřisvědčí theoretické dedukci, tomu poví to historie snah těch.

Z ní je patrné, že myšlenka světového jazyka vznikala a rostla touž cestou, jakou vznikají a rostou myšlenky, tvořící složky nynějšího stadia kulturního vývoje lidstva a určující jeho budoucnost. Idea všejazyka vznikla přirozenou nutností jako organický výron celkového stavu lidského tělesa sociálního, jako myšlenka lidské všeduse. Nejprv se kmitla a uvědomila sporadicky v hlavách jednotlivců vynikajících, kteří předstihli rozvojem svých duševních mohutností své současníky a dohlédli dále vpřed do budoucnosti. Pak se objevovala častěji, až zaujavi celé množství hlav v různých končinách světa, u různých národů, v různých společenských poměrech, spojila je k společné práci za svým uskutečněním.

Tento organický postup vylučuje, že by myšlenka všejazyka byla chimérou přepiatých, jednostrannou horlivostí rozháraných mozků nebo dobrodružným nápadem pochodícím z rozumu ovládaného fantasií, což obojí byly by abnormální výstřelky neschopné dalšího vzrůstu. Ovšem objevují se také takové chiméry a výstřelky periodicky a s jakousi pravidelností; rozmanitost vývoje poskytuje příležitost k opakování se stejných nebo podobných nesmyslností; avšak nikdy ne na vrcholcích nýbrž jen v nížinách kultury. Myšlenky, jakkoli by se zdály někomu dobrodružné nebo, řekněme krátce, utopie, které se vyskytnou v stejné podstatě tu u Platóna, tam u Spinozy, u Kanta atd., nikdo nebude podceňovati, kdo si uvědomí, že velký duch opáčí a anticipuje svým vývojem vývoj lidstva v celku.

V této příčině esperantism hrdě poukázati může na svůj rodokmen. Co mohlo se zroditi v mozku — abych jen některé z nejznámějších případů uvedl — nějakého Leibnitze, Komenského a pro co se mohl rozehráti za naší doby Spencer, to má v sobě jádro zdravé a schopné dalšího vývoje, to zasluhuje býti uskutečněno společnou snahou lidstva.

Z toho plyne mé přesvědčení, že snahy o světový jazyk, jak se projevují hnutím esperantismu, mají hlubší význam, než který by jim prisouzen byl ze zřetele usnadnění styků mezinárodních. I kdyby ukázaly se v této příčině nedostatečnými, sblížení národů a průkopnická práce ve službě humanity zůstala by trvalým ziskem. Ale i ten praktický cíl, k němuž esperanto směřuje, objeví se v jiném, sobě příznivějším světle, když naň pohlédneme se stanoviska sporů národnostních. Jazyk světový nebo, chcete-li, dorozumivací prostředek světový, nutně odstraní řevnivost mezi národy velkými, snažícími se rozšířením svého jazyka uplatniti svou převahu v jakémkoli ohledu, a zbaví národy slabší a menší obavy před následky konkurence s mocnějšími na fóru světovém. Dnes platí tři čtyři jazyky za světové v tom smyslu, že člověk, který některý z nich ovládá, projíti může celým světem, protože veřejná zařízení pro mezinárodní styky jsou učiněna (v jistém smyslu vynucena) v ohledu na příslušníky těchto privilegovaných za stejnocenné uznaných národů. Osudná to věc, která zmalomyslněti může příslušníky národů menších a na druhé straně důvod poskytnouti pro národnostní znásilňování jejich. Jak jinak by se věci měly, kdyby mezinárodní styky dály se esperantem!

Všechny námitky a všechna nechuť proti snahám o nějaké esperanto mizí při pomýšlení na úlohu, jakou míti by mohlo — a doufejme, že budeme míti — ve sporech jazykově národnostních, které nepopřávají lidstvu klidu v práci kulturní. Esperanto neučiní zbytečným žádný jazyk; nebude činiti nároků přesahujících obor jeho oprávněnosti — básnit v esperantu odporuje pojmu esperanta a pojmu poesie. Esperanto nebude vývoji kulturnímu v ničem překážeti, ale doplní jej ve směru, ve kterém může lidstvu vzejíti požehnání.



FONDO DE REGNAJ ORGANIZAĴOJ DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ.

Dokumento pri la organiza agado de s-oj Kühnl.

Aldono al la raporto »La rezultato de mia paciga entrepreno« eltirita el la klarigo sendita de »Bohema asocio esperantista« al la aŭstria ministerio de internaj aferoj. Redaktis H. K. Bouška kaj Dro Stan Kamaryt. — (Fino).

El la prezentita klarigo, fidele respondanta al la realeco, estas videble, ke:

1. kiam (29./XII. 07) oni decidis fondi centran societeton sub la nomo Bohema asocio esperantista kun la organo Bohema esperantisto, ekzistis kaj estis proponata neniuj societo kun similaj celoj kaj kun la sama titolo;

2. kiam oni formale fondis la societeton (per prezento de la statutoj 3./VII., per ministeria aprobo 16./VII., per fonda kunveno 27./IX. 1908), oni ne povis scii kaj oni ne sciis, ke dum la daŭro de tempo la titolon Asocio proprigis al si alia societo, kies fondo kaj precipe plena nomo estis laŭeble severe sekretigata tiel, ke la suspekton pro provo trompi nia Asocio povas kiel eble plej trankvile kaj energie rifuzi;

3. la konfuzon devenintan el la identeco de la titoloj kaŭzis la societoj Asocio-Unio kaj Ligo-Asocio, kiuj kaŭzis ĝin tute konscie, ĉar estis ĝenerale konate, ke nia Asocio estis fondata, kaj ĝia fonda kunveno estis anoncita per ĉiuj ĵurnaloj de Praha, sekve oni ne povas kaŝi la suspekton, ke la klopodo fari konfuzon estas en la partio de la societo Ligo-Asocio. La praveco de tiu ĉi suspekto estas ankoraŭ pli evidenta, se oni rimarkigas la fakton, ke Asocio-Unio kaj Ligo-Asocio konsekvence imitas niajn presaĵojn, uzante laŭeble la samajn tekstojn;

4. la nomo Asocio estis transprenita ne de ni, sed de l'alia partio, kiu cetere, sciante pri nia fonda kunveno, povis en sia propra intereso atentigi nin pri la identeco de la titoloj;

5. Ligo-Asocio disponante per du titoloj povas, se ĝi havas bonan volon, eviti la konfuzon per la uzado de la nomo »ligo«, kiel ĝi tion faris komence, kaj kontraŭe ni ne povas cedi de la titolo Asocio, ĉar ĝi estas la sola titolo aprobita per la statutoj kaj ĉar, eĉ se ni volus cedi, ne ekzistas titolo, kiun la alia partio ne estus akceptinta por siaj societoj...



KIEN ĜIN DONI?

Felietono de *Jan Neruda*. El la bohema lingvo tradukis *ing. J. Vostatek*.

(Fino).

Kaj dum unu tia promenado okazis, ke mi rimarkis sur la strato tiujn kruĉojn, botelojn kaj bakpatojn, kiujn la afabla leganto rimarkis jam en la komenco de tiu ĉi artikolo.

La kaŭzo, kial oni trovas la kruĉojn, botelojn kaj bakpatojn sur la strato, estas sekvanta:

Ĉiu Praha'ano povas posedi ian kruĉon eventuale botelon kaj ankaŭ bakpaton — tion oni ne malpermesas kaj ne punas. Sed iafoje okazas, ke la kruĉo ekzemple fariĝos disbatita — kaj nun komencas la historio. Kien ĝin doni? Se vi elĵetos ĝin sur la korton, devigos vin la domgardisto, ke vi ĝin reprenu. Se vi elĵetos ĝin sur la straton, venos policisto kaj arestos vin. Se vi ĵetos ĝin en la veturilon de balaisto, li ĝetos ĝin reen. Li ne akceptos ĝin, eĉ se vi donos bonan trinkmonon al li, oni malpermesas tion severe — Bone! Do vi prenos la kruĉon nokte, eliros sur la straton kaj starigos ĝin nerimarkate, nu kien ajn. Kaj sekvantan matenon forigos ĝin la balaisto eĉ sen trinkmono kaj estas bone.

Infana penso traflugis mian kapon. Ĉu ni — tio estas mi kaj Anjo — ne povus nokte ekkapti la matracon, transporti ĝin en la najbaran straton kaj tie elŝuti la pajlon? La ideo sendispute malbona — hontinda — kontraŭleĝa — sed mi konfesas: ĝi plaĉis al mi. La homo estas, ah, tiel inklina al la malbono.

Sed — mi ne estas infano de Fortuno. Subite, dio scias de kiu flanko, aperos policisto. Li volos, ke mi la pajlon rekolektu. Mi kontraŭstaros, faros fine ian parolan krimon, oni arestos min, kondamnos min — kaj mi perdos mian ĝisnunan bonan reputacion — sed tio jam estas ĉio egale — mi —

»Via Moŝto« — flugiris subite Anjo en la ĉambron — »mi jam scias, kien ĝin doni! La laktistino, kiu staradas kun sia veturilo antaŭ la domo akceptos volonte la pajlon, ĉar ŝi bezonas ĝin por siaj ĉevaloj!«

»Sed estas tio certa?«

»Tute certa!«

Kion mi dirus plu? Mi dormis bone la tutan nokton. Kaj sekvantan matenon mi kaj Anjo portis la matracon al la laktistino, kiam kompreneble Anjo estis demandinta, ĉu ŝi mian donacon ankaŭ efektive akceptos.

Tio estis bela momento! Kiam la laktistino estis redonanta al mi la malplenan sakon, mia koro forte ekbatis per dolĉega ekscito, mi kisis ŝian manon, ĉirkaŭprenis pasie ŝian ĉevalinon kaj paŝis kun malseketaj okuloj hejmen.

Kaj hejme ni kaptis la novan pajlon, kaj ni denove plenigis la matracon. Kaj kiam la pajla matraco estis jam plena, mi ĉirkaŭprenis Anjon, komencis fajfi »Sur la verda

herbejo« kaj ni dancis ĉirkaŭ la matraco ĝis niaj kapoj komencis sin turni.

Jen la tuta historio, kiel ĝi okazis kaj kiel mi ĝin rakontas. Ĝi estas bela kaj laŭtempa; mi estas kontenta kun ĝi kaj mi finas.



EBRIULO.

El »*Črty a povídky*« (Skizoj kaj rakontoj) de *Vojta Beneš*.

Somera vespero varme spiris. Sur griza, polvoplena ŝoseo trenis sin homa kreaĵo: mizere ŝanceliĝis ebriulo, maljuna vagisto. Li havis disŝiritan vestaĵon, liaj haroj kaj barbo estis en malordo, la plumbokoloraj okuloj estis elstarantaj sen fajrero de vivo; lia vizaĝo estis malsane pala, preskaŭ verda.

De li eliradis malbonodoro, terura, abomena malbonodoro de brando. Amaso da vilaĝaj infanoj ĉirkaŭ kuris la ebriulon; ili ĵetis sur lin sekan koton kaj ŝtonojn. La kuraĝaj grandaj knaboj batis lin per longaj vergoj, forkurante kun krio post ĉiu bato.

Li insultis ilin per raŭka voĉo kaj li provis dispeli ilin per sia granda bastono, kiam iliaj atakoj pligrandiĝis. Nun li ekstaris, apogis sin per ambaŭ malpuraj manoj sur bastono, elstarigis siajn ebriajn okulojn je infanoj kaj volis ion diri.

Sed la brando skuis lin, la bastono ekglitis kaj la ebriulo falis per la vizaĝo en polvon de tero... Polvo penetris en lian vizaĝon, en okulojn kaj harojn kaj sufokis, sufokis malagrablege.

La grandega krio de infanaj gorgoj akompanis la falon de lia korpo teren kaj kelkaj bone celintaj batoj ne preterpasis sian celon. La ebriulo sole ekĝemis, movis svene siajn sangantajn manojn, provis ne fali, kaj lia homeco, kiu donis al li la rektan kreskon, faris la lastajn eksperimentojn, por ke ĝi ne estu tute venkita per regado de brando. Sed vane. Tiuj ĉi manoj estis jam malfortaj, senpotencaj kontraŭ la forta besto — la brando. Ĝi ekregis lin tute; ĝi mallumigis lian cerbon, turmentis lian animon, faligis lian korpon — ĝi, la forta reganto de malfortuloj kaj malkleruloj.

Unu de la knaboj proksimiĝis singardeme al la ebriulo kaj ekbatis lin subite per sia longa vergo.

La ebriulo faris eĉ ne unu movon, sole spiregis peze, tiel li estis malforta kaj sen sento. La rondo de infanoj

senĉese pli kaj pli mallarĝiĝis kaj iliaj atakoj estadis ĉiam pli kaj pli kuraĝaj. Ili ne vidis, ili ne aŭdis.

Antaŭ tiu amaso kaj spektaklo stariĝis iu viro — nekonata homo. Li havis trankvilajn, moderajn okulojn kaj altan, helan frunton.

»Kial vi batas per ŝtonoj tiun ĉi homon?« li demandis per trankvila voĉo.

Sed la infanoj ne rimarkis lin, tiel ili estis okupitaj per sia kruela ludo kun vagisto. Li staris proksime, kaj liaj trankvilaj, moderaj okuloj malgajiĝis, lia alta, hela frunto sulkiĝis.

»Kial vi batas per ŝtonoj tiun ĉi homon?«, ekparolis denove la fremdulo al la infanoj. La sulkiĝinta frunto denove ekheliĝis, kaj la bluaj okuloj silente ekbrilis. Ili ekbrilis per granda amo al infano.

Nun forfalis la timo de infanoj kaj unu knabo ekkriegis moke: »Li estas ebriulo, li estas ja ebria homaĉo!«

Kaj la ceteraj infanoj ankaŭ fariĝis kuraĝaj kaj kriis: »Ho, li estas ja ebriulo! Li estas vagisto! Li ebriiĝis ĉe hebreo per brando!«

»Kaj pro tio vi ŝtonbatas lin? Kiu permesis tion al vi? Aŭ kiu ordonis tion al vi? Ĉu li ne estas ankaŭ homo? Ĉu li ne estas via frato kaj via proksimulo? Ĉu vi ankaŭ kredas, ke Kristo diris: Amu vian proksimulon! Sed vi ne faras tion, kiel ne faras ĝin ankaŭ viaj patroj?«

La infanoj ne komprenis tiajn vortojn.

»Sed, li estas ebriulo!«, ekkriis denove la kuraĝa knabo. La ceteraj silentis.

La ebria vagisto rektigis sin duone sur la malmolatero, levis sin sur la malfortaj manoj kaj duone kuŝante, duone sidante kun elstarantaj okuloj rigardis sen kompreno la ĉirkaŭon.

»Ĉu la ebriulo ne estas homo?«

Neniu respondis.

»Kaj vi volas eble esti juĝistoj? Tial vi eble estas tie ĉi, por ke vi lin batu per ŝtonoj kaj punu lin pro ebrio? Ĉu li ne estas sufiĉe punita, kiam li, sklavo de brando, rampas kaj falas ebria en polvon de tero? Eble tial li estas tie ĉi ebria, kompatinda, kuŝanta sur malmola sablo de strato, por ke vi, kiam vi vidas lian mizeron kaj lian malaltecon, kiam vi vidas malbelecon de lia faro, kiam vi vidas la teruran malbonecon de ebrio, evitu la ebrion en ĉiuj tagoj de via vivo. La forto de brando estas terura, la forto, kiu ne

nutras, sed mortigas. Li estas tie ĉi por averto al ĉiuj, sed ne por puno.

— Ĉu vi volas ankoraŭ fari al li malbonon? Pli bone estos, se vi dankas al li, ke li montris al vi la vojon, kiu estas la vojo de moko, mizero kaj morto por serĉi la novajn pli bonajn vojojn de la vivo.

Kaj la ebriulo eligis ankoraŭ pli multe siajn malklarajn okulojn kaj rigardis per ili seninterese la infanojn kaj la fremdulon, kiu havis por li la kompaton, por la kompatindulo — — — Al li ŝajnis tiuj ĉi vortoj strangaj, neniam li aŭdis tiel paroli. Li ricevis ĉiam sole insultojn kaj atakojn de homaj manoj. Kaj li ankaŭ sole insultis kaj malbenis.

Sed nun ŝajnis, ke liaj okuloj ploras.

Ankaŭ la infanoj ne komprenis la strangajn vortojn de nekonata homo, sed iliaj junaj koroj sentis ion nekutiman, ili sentis ankaŭ, ke la vortoj estas pezaj kaj veraj. Ja timo falis sur ilin kaj en la koro ili eksentis ankaŭ kompaton kun la ebriulo en blanka polvo de strato, kies okuloj ploris.

Poste ili foriris trankvile kaj silente al lavilaĝo. Ankaŭ la fremdulo foriris. Sole la ebriulo restis tie en polvo de tero, sola kaj forlasita. Al li ŝajnis, kvazaŭ iu forŝovus la ŝtonon de lia koro. Sed liaj sentoj malfortiĝis kaj en lia memoro estis malplene kaj silente kiel en akvaj profundaĵoj.

Liaj manoj tremis denove kaj malfortiĝis, kaj li falis denove per tuta korpo teren. La fontetoj de sango malrapide elfluis de sangantaj manoj kaj vangoj.

Somera vespero envolvis lin en sian fabelan vualon. Kompatema virino estas la somera, varma vespero.

La tero vekiĝis antaŭ liaj okuloj. Kvazaŭ kreskus antaŭ li vastaj, dezertaj kampoj malproksimen, profunden — — Li ne jam leviĝis.

Matene, kiam en oriento la tago vekiĝis, oni sonorigis en vilaĝo la mortscigantan sonorilon. Oni trovis post la vilaĝo la kadavron de la ebriulo.

El la bohema lingvo tradukis *Ant. Janalíkova*.



HUNDO.

Boheme verkis *Karel Horký*. Kun la permeso de l' aŭtoro esperantigis *H. K. Bouška*.

Dum someraj tagoj estadis tiaj varmegoj, ke tage ni preferis dormi kaj kuŝi sur ombrigitaj deklivoj kaj nur antaŭ-

vespere ni ekmarŝis. La noktoj estadis belegaj, varmetaj, kaj ne pluvis eĉ unufoje dum tiuj varmegaj, radioplenaj tagoj, kiam ankaŭ la marbordo estis forlasita, ĉar la burĝoj el Marseilles ne loĝis ĝis tiam en apudmaraj villoj kaj la fiŝkaptistoj kaptadis malproksime de bordoj. Sole iafoje ekscite ekmiaŭis kato el iu soliĝinta villo aŭ fiŝŝipeto malrapide eliĝis el la bluo de l' horizonto kaj direktis al bordoj por elŝipigi iun familianon. La fiŝkaptisto ekmarŝis sur deklivoj supren, al vinberejoj, la ŝipeto malaperis kaj denove estis dezerte kaj silente sur la bordo. Iafoje, kiam mi sidiĝis sur marbordan rokon kaj fermis la okulojn pro peza prem de varmego, mi tute klare aŭdis, kiel maraj kankroj restintaj en truoj de rokoj gratas kaj bruas por elrampi denove en akvon. Oni eĉ aŭdis, kiel sub la bordo sible trafluas akvo en profundigitajn kavaĵojn inter ŝtonegoj. Ĉio krakis, bruis, ĝemis kaj mia malagrabra sento estis, ke sub mi iu venkita potenco preparas vulkaniĝi. Okazadis, ke dum tiuj varmegaj tagoj eĉ akvo malbonodoris putre, malsanige, kaj sur rokoj la suno mortigadis centojn da malgrandaj bestoj elĵetitaj de ondo. Estis malgaje dum tago, sed la noktojn mi amis.

Unu helan kvietan nokton, sude de Carnoules, mi trovis forlasitan fiŝkaptistan dometon. Ĝi estis agrable sternita per foliaro kaj sur la loko por kapo per marherbo. Mi eksentis la deziron pasigi la nokton en la dometo. Eĉ unu reto ne estis tie, la fiŝkaptistoj foriris verŝajne okcidenton. Mi demetis la surtuton kaj botojn. Proksimume tri cent paŝojn pluen estis kelkaj villoj, sed ŝajnis, ke estas senvive en ili.

